

La 2a poresperanta vojaĝo en Srilanko de
Stefano KELLER, esperanto-instruisto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-165/Radiokasedo-165-86-6-B-1030-Claude-GACOND-La-2a-poresperanta-vojaĝo-en-Srilanko-de-Stefano-KELLER-esperanto-instruisto.mp3>

Cl.- Parolas Claude GACOND nome de Svisa Radio Intemacia.

Hodiaŭ mi diskutas kun Stefano KELLER, kiu estas instruisto de Esperanto ĉe Kultura Centro Esperantista kaj ankaŭ en Srilanko. Li fakte faris du vojaĝojn kaj pri la unua ni jam raportis antaŭ kelkaj monatoj.

Sinjoro Stefano Keller, vi bonvolu raporti eble tre rapide pri la unua ekspedicio al Srilanko.

SK.- Unuan fojon mi flugis al Srilanko la 15-an de januaro en 1984. Tiam mi restadis tie nur kvar semajnojn. La rezulto de tiu agado estis la dekobligo de la loka esperantistaro, de 4 al 40 parolantoj. Kaj ĉio tio okazis sen antaŭpreparo, en malfavoraj cirkonstancoj, dum mallonga tempo.

Cl.- Kaj vi reiris post kelkaj monatoj, ĉu ne? Do, eble vi diru ion pri kio okazis poste.

SK.- Mi reiris ekzakte naŭ monatojn poste. Fakte, la ideo koncipiĝis en mi en Srilanko mem, fine de la unua agado, kaj, kiel infano, la agado naskiĝis naŭ monatojn poste.

Cl.- Do, vi eble raportu pri tiu ,graveda‘ periodo, ĉu ne? Kiam, kio okazis en Srilanko mem, kaj eble kiel vi pretigis la agadon en Svislando.

SK.- En Srilanko okazis tiel: Regule estis studaj renkontoj post mia foriro de Srilanko, komence ĉiusemajne, poste monate, po unu vesperon en la Publika Biblioteko de Kolombo. Sed tamen, post certa periodo, ili ne plu povis okazigi instruadon en la biblioteko pro retiro de la permeso pri senpaga uzado de la ejo, kaj ankaŭ pro la okupiteco de s-ro Jesudasan, kiu estas la prizorganto-instruisto de Esperanto-Grupo Srilanka, ĉar li devis ripari sian hejmon.

Cl.- Kial ?

SK.- Ĝi estis bedaŭrinde detruita dum la tumultoj, kiuj okazis en 1983, somere, pro sciataj kaŭzoj inter tamiloj kaj sinhaloj.

Cl.- Ĉar li estas tamilo, ĉu ne ?

SK.- Jes, li apartenas al la tamila etno.

Cl.- Do, eble nun bonvolu diri, kio okazis en Svislando mem por la pretigo de la dua ekspedicio.

SK.- En Svislando kaj en Eŭropo kaj en esperantujo mi multe prelegis, raportis pri la srilankaj progresoj kaj serĉis kunlaborantojn por la dua poresperanta agado en Srilanko. Du esperantistinoj decidis veni kun mi: Nicole Bérout el Svislando kaj Elisabeth Woormans el Nederlando.

Cl.- Kaj la forveturo okazis kiam ?

SK.- La forveturo okazis do naŭ monatojn post la ‘koncipiĝo’, meze de novembro en 1984.

Cl.- Kiajn laborplanojn vi prilaboris ?

SK.- Niaj planoj por trimonata agadperiodo estis: unue, progresiga kurso por la tiamaj grupanoj; due, prelegoj, enkondukaj kursoj en diversaj lokoj; trie, firmigo de la kontaktoj, kunlaboro ĉe la Publika Biblioteko en Kolombo; kvare, kontaktoj kun la edukaj, kulturaj instancoj, gazetaroj, radio, televido; kaj kvine, kreo de esperanto-centro.

Cl.- Kaj okazis la forveturo, kaj kio estis fakte viaj esperoj ?

SK.- Renkonti plej multe da srilankaj esperantistoj kaj realigi ĉiujn punktojn de la plano.

Cl.- Jes, do, nun vi retrovis la antaŭviditajn personojn, ĉu ne, kiam vi alvenis en Srilanko? Eble vi bonvolu rakonti tion.

SK.- Preskaŭ ĉiujn, kun kiuj mi korespondis kaj krome kelkajn, kun kiuj mi ne havis kontaktojn deĉe la unua agado.

Cl.- Bonvolu raporti do nun pri tiu agado.

SK.- La estraro de la Publika Biblioteko en Kolombo ebligis al mi senpagan uzon de la kursejo dum mia aktivado en Srilanko. S-ro Pierre Monod, ambasadoro de Svislando en Srilanko inaŭguris la kulturen programon kaj kurso-serion.

Cl.- Ĉu ni povus aŭdi lin ?

SK.- Jes. Li parolis pri Esperanto, kaj tre favore al Esperanto, kaj dankis la estraron de la Publika Biblioteko por la ebleco daŭrigi la kurson tie.

Cl.- Ĉu li parolis ankaŭ pri Svislando?

SK.- Jes, li parolis pri Svislando, pri Kultura Centro Esperantista kaj pri CDELI, Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, kiu estas en La Chaux-de-Fonds, same kiel Kultura Centro Esperantista.

Cl.- Li parolis en la angla, ĉu ne ?

SK.- Jes, ĉar li diris, li bedaŭeinde parolas nek la sinhalan, nek Esperanton, nek la tamilan.

Cl.- Do, eble ni aŭdu kelkajn vortojn :

Pierre Monod (sonregistraĵo): «... to help the people communicate, I am convinced that Esperanto is one very important element...”

SK.- Bedaŭrinde ne estis longviva tiu kurso, ĉar post kvar tagoj oni arestis teroristojn en la biblioteko, kiuj volis tie kaŝdeponi bombojn.

Cl.- Kaj ĉu tiu militagado ĉesigis vian aktivecon?

SK.- Ne, tute ne, ĝi signifis la komencon de pli vastskala kontaktado por Esperanto.

Cl.- Do, rakontu pri tiu larĝigita laborfazo.

SK.- Ĉiukaze estis en nia plano kontakti universitatojn, kaj nun ni estis devigitaj fari tion pli frue, kaj ni faris tion. Mi iris al la Universitato de Kolombo, kie en la Laborista Edukinstituto mi parolis kun la direktoro, li estas s-ro George Mendis. Li tre ĝoje akceptis kaj bonvenigis Esperanton kaj la sekvo de la kurso okazis tie.

Cl.- La samaj lernantoj venis ?

SK.- Ne, ne ekzakte la samaj, ĉar ankaŭ la tempo de la kurso ne estis la sama kiam la Publika Biblioteka, sed ĉi tie estis novaj lernantoj kaj kelkaj de la aliaj grupoj, kiuj povis veni.

Cl.- Kaj ĉu vi ne laboris ankaŭ ĉe la Ministerio aŭ io tia ?

SK.- Ĝuste, tiu ĉi kontakto ĉe la Universitato en Kolombo donis al mi plurajn aliajn kontaktojn. Ekzemple tiun de la Laborministerio, kie s-ro Premaratne estas sufiĉe grava ĉefo en iu fako, kaj li invitis min okazigi kurson ankaŭ ĉe li por la kunlaborantoj en la Ministerio.

Cl.- Kaj pri viaj aliaj kontaktoj?

SK.- Mi havis plurajn kontaktojn krom tio, ĉar mi vojaĝadis ĉirkaŭ Kolombo kaj mi serĉis aliajn eblojn ĉe bibliotekoj kaj ankaŭ budhanaj monaĥoj invitis min instrui, fari Esperanto-kurson en temploj, sed bedaŭrinde mi ne povis ĉion akcepti, ĉar la programo estis jam preskaŭ plena.

Cl.- Kaj por tria vojaĝo, ĉu ne?

SK.- Sed la plej grava kontakto, kiu rezultis el tiu Universitato en Kolombo estis la sekvo, la esperanto-kurso ĉe Universitato en Kelaniya, kie laboras s-ino Daya Wickramasinghe, kiu invitis min okazigi kurson ankaŭ ĉe ili. Do, tie estis la plej fruktodona kurso, fakte ĉi tie mi donis la plej longan tempon laŭ miaj ebloj, estis proksimume dusemajna kurso kaj mi havis la plej grandan lernantaron tie.

Cl.- Kiom da ?

SK.- Proksimume 40 personoj, sed en la kursoj en la lecionoj aperis plejofte pli ol dudekkvin personoj, sed estis la plej larĝa grupo ĉi tie.

Cl.- Se vi sumas la kursanojn, kiujn vi havis en ĉiuj kursoj, estis kiom da personoj entute ?

SK.- Do, se ni prenas la bibliotekon en Kolombo, kie tamen estis en la komenco kurso, poste en la Universitato de Kolombo, kaj en la Laborministerio, kaj fine ĉe la Universitato de Kelaniya entute estis proksimume 100 lernantoj ĉi-foje.

Cl.- Kaj kio estas via konkludo al tiu sufiĉe fruktodona vojaĝo, ĉu ne ?

SK.- Jes ! Ni povas nomi ĝin fruktodona, ĉar estis granda disvolviĝo, evoluo en la esperanta vivo en Srilanko, ĝuste pro tiuj kontaktoj mi havis aliron al la gazetaro kaj aperis multaj artikoloj pri Esperanto, kun la adreso de Esperanto-Centro Srilanka, interalie, kaj ni ricevis plurcent informpetojn el la tuta insulo. Kaj nun oni pli bone kaj pli multe scias pri Esperanto en Srilanko.

Cl.- Ĉu ili povis bone asimili la lingvon dum tiu mallonga periodo ?

SK.- Mi proponas, ke ni aŭskultu unu el la lernantoj de tiu lasta agado:

El sonregistraĵo: ‘Ĉiuj lernis bone Esperanton! Api esperanto bhashava hondete igena gatta’.

Li parolis parkere kaj tuj tradukis sin en la sinhalan.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond parolis kun Stefano Keller pri lia por-esperanta laboro en Srilanko. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014